

El "Ludu Goon VIII" turniro sur OGS

Ekde januaro 2022 okazas GO-turniro, nomata “Ludu Goon VIII” en grupejo “Esperantejo” sur OGS Go-servejo (<https://online-go.com/group/137>). Nun prezentos analizon por frua etapo de unu partio el la turniro, ludita inter eble ne-esperantistaj partoprenantoj. Do ne skribas la nomojn de la ludantoj.

Se vi havas konekton al la inter-reto, vi povas postludi la ludon ĉe jena ligilo;



<https://online-go.com/game/40045642>

Ŝajnas bone, ke la turniro estas malfermita al ne-grupanoj, ĉar tio donas ŝancon al ne-esperantistaj go-ludantoj ekscii Esperanton.

Ambaŭ ludantoj havas KJUŬ (級) rangojn, kaj nature la metoj ne estas tre bonaj.

Por analizo mi ankoraŭ uzadas Arte-faritan Intelekton “Leela Zero”, kaj la utiligilan programon “Lizzie”.

Ĝis Nigra 21a meto (sur koordinato E-4), ambaŭ ludantoj bone ludis.




Anstataŭ sinligo, Blanka 22a
meto (C-5), Leela Zero
montras maldekstran
diagramon.

Blanko devus unue minaci la unu ŝtonon sur tri-tri punkto, kaj poste sinligi. Kaj forlasante la MalSupran MalDekstran angulon, Blanko devus rapidi al pli gravan loko, la MalSupra Dekstra angulo.

Sekve Nigro monopolumu
la Supran Dekstran angulon
per dupunkta monopolumo.

Laŭ la analizo de Leela Zero, Blanko povas fari grandan kvazaŭteritorion en la maldekstra rando.




Bonvole revidu la registraĵon en la unua paĝo.

Anstataŭ la Blanka minaco, B-24 (sur B-3), Leela Zero montras la premon (sur E-5).

En ĉi tiu okazo, la plej grava estas la limo inter nigra kvazaŭteritorio en la MalSupra rando kaj blanka kvazaŭteritorio en la MalDekstra rando.


Laŭ Leela Zero, influite de la formo de Malsupra Maldekstra angulo, ŝanĝiĝas la plej bona meto en la Dekstraj anguloj. Tio estas tro subtila por amatoroj,



Bonvole revidu la registraĵon en la unua paĝo.

Anstataŭ la Nigra tuŝmeto, N-27 (sur D-11), Leela Zero sugestas la unu-punktan salton (sur G-4).


Ni amatoroj nur ĝuu la lertajn ŝtonmetojn montritajn.



Bonvole revidu la registraĵon en la unua paĝo.


Anstataŭ la Nigra pinĉ-tuŝmeto, N-29 (sur D-9), Leela Zero montras la unu-punktan monopulumon (sur P-16).

Nigro devus duone rezigni savi la unu ŝtonon en la MalDekstra rando, kaj devus fari grandajn teritoriojn en la Dekstra kaj MalSupra rando.



En pli detala analizo post B-6 en la supra diagramo, Leela Zero alie montras sin-gardantan meton, sur F-2, kaj la procedo en la maldekstra diagramo.


Interese estas, ke la tre forta Artefarita Intelektio elektas sin-gardantajn ŝtonmetojn en la centra kampo, kiel B-16 kaj N-17.



Bonvole revidu la registraĵon en la unua paĝo.

Anstataŭ la Nigra meto, N-31 (sur D-71), kiu eble nomiĝas “batanta, saltanta tuŝmeto”, Leela Zero montras la Diagonaliĝon (sur F-5).

Leela Zero taksas Nigrajn antaŭajn du tuŝmetojn N-27 kaj N-29 malsukcesa, kaj sugestas, ke Nigro faru teritorion en MalSupra rando.



Estas iome kurioza, ke post kelkaj ŝtonmetoj laŭ la propono de Leela Zero, ĝi proponas alian procedon malsama ol la antaŭa propono.

En la maldekstra diagramo, je du ŝtonmetoj post de la antaŭa diagramo, Leela Zero proponas alian punkton (unu vojon pli altan) por okupi la MalSupran rando, kaj nature, la sekvan procedon alimaniere.

MORI Hitosi